



Norvega Esperantisto

E S P E R A N T O B L A D E T

N-ro 7 1967

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

Cefredaktoro: Johan Hammond Rosbach

3-a periodo
33-a (38-a) jaro
Monata

Johan Matland:

PROLOGO

en la 40-a landa kongreso de Norvega Esperantista Ligo
pentekoste 1967 en Sauda

Mi pensis ekverkinte la prologon
ke interesos aŭdi analogon
el La bibli' pri nia lingvideo.
En La unua libro de Moseo
mi legas el ĉapitro dekunua
pri ĉiuj gentoj de filar' de Noa:

Kaj unu lingvo estis sur la tero,
kaj unu sola parolmaniero.
Sed, ĉar la homoj ekkonstruis urbon
kaj turon atingonta la ĉielon,
la Eternulo kreis la perturbon.
La jenaj vortoj estis eldirataj:
Nur unu lingvon ili ja parolas,
kaj ili ne plu estos malhelpataj
en ĉio, kion ili fari volas.
Ni iru do, konfuzi la lingvaĵon
disigi ilin sur la tersupraĵon!

Jen la rakonto pri la tur' Babela,
kaj ĉu ĝi estas vera, ĉu fabela,
ni ne diskutu, sed Moseo pravas,
ke l' homoj kunlabori ne sukcesas,
se ili ne komunan lingvon havas,
pri tio ĉi ni certe ĉiuj jesas.
En La biblio estas sub «La agoj
de l' apostoloj» ankaŭ rakontite:

Kaj kiam venis Pentekostaj tagoj,
en unu loko ĉiuj kolektiĝis.
Kaj venis tiam el ĉiel' subite

tre forta sono kvazaŭ el blovego
de forta vent' kaj ĝi pleniĝis
la tutan domon kie ili sidis.
Kaj jen aperis disirantaj langoj
el fajro ŝajnis kvazaŭ, kaj pleniĝis
ĉiuj el ili de l'Spirito Sankta,
kaj tuj aliajn lingvojn ekparolis.
Kaj en Jerusalemo tiam loĝis
tre piaj judoj el la tuta mondo,
kaj kiam tiu sono jen aŭdiĝis,
la homamas' kunvenis kaj miregis,
ĉar ĉiu nun aparte aŭdis ilin
paroli lian propran dialekton.
Kaj ĉiuj konfuziĝis kaj ekmiris
dirante unu al alia: Vidu!
Ĉu ne Galileanoj estas tiuj
kiuj parolas, kiel do ni aŭdas,
en dialekt' en kiu ni naskiĝis?

La Partoj, Medoj, Elamanoj kaj
loĝantoj en la Mezopotamio,
Juduj' Kapadoki', Azio, Ponto,
Frigio, Pamfilio, Egiptujo,
la partoj de Libio ĉe Kireno,
Romanoj pasloĝantaj, ĉiuj judoj,
Kretanoj, prozelitoj kaj Araboj —
en niaj lingvoj ili ja parolas.
Kaj ĉiuj konfuziĝis embarase
dirante: Kion tio ĉi signifas?
Aliaj moke diris: Ili estas
de mosto plenaj kaj ebriaj ŝajne.

AKADEMIO DE ESPERANTO

La nuna konsisto

Jus okazis la ĉiutrigara renovigo de triono de la Akademiano. La elirantaj membroj estiĝis reelektitaj. Krome riĉiĝis la Akademio per jenaj novaj membroj, kiuj eniris poste-
nojn vakantajn pro morto aŭ eksiĝo. (S-ro Ossa):

S-roj	Albault Ariste Atanasov Auld Bernhard (Sekret.) Bokarev	S-roj	Faulhaber Gregor Guĝev Haferkorn Hodakowski Jung Kalocsay Kawasaki Lapenna Lippmann Mijake Nakamura Neergaard (Vic-Prez.) Pumpr Rakuŝa	S-roj	Régulo Pérez Rosbach Rossetti Rotkviĉ Setälä Sevak Söderberg Solzbacher Sonnenfeld Stop-Bowitz Szilágyi Tárkony Vilborg Waringhien (Prez.) Wong Kenn
F-ino	Boulton				
S-roj	Bugge-Paulsen Butler Collinson Conterno Cseh De Hoog Domingues Downes				

Krome estis decidita la restarigo de posteno de Korespondanto de la Akademio por la Sekcio Teknika Vortaro kaj elektita por tiu posteno S-ro A. Broise (Francujo).

22. VI. 1967, La Sekretario,
Roger Bernhard.

MADAGASKARO

Kiel vi povis legi en la jarraportoj, N.E.L. «adoptis» la malgrandan Esperantistan Aso-
cion de Madagaskaro, klopodante helpi ĝin per konsilioj kaj proponoj. La plimulto de la membroj estas junuloj (tio ja estas bona), sed ili grandparte ne havas monon por pagi

Jes, tiel ĉi rakontas La biblio pri Pentekostkunven de l' apostoloj, ke ĉiu hom' el kiu ajn nacio ja kompreniĝis en interparoloj. Simbola estu tiu ĉi rakonto por ĉiuj ni en tiu ĉi renkonto. Ni estas ankaŭ apostoloj iaj kun lingvo samefika, pli moderna, kaj kvankam ni ne estas tiel piaj, nin ja plenigas la ide' interna, kaj kiel ili ankaŭ ni proklamu: La nomoj unu la alian amu!

S-ro Ariste (Estonio), F-ino Boulton (Anglujo), S-roj Guĝev (Bulgario), Mijake (Japanujo), Rossetti (Anglujo), Sonnenfeld (Urugvajo), Tárkony (Hungarujo).

La nuna konsisto de la Akademio estas sekve:

ekz. la kotizojn al U.E.A., kaj la movado en Madagaskaro suferas pro nescio pri la ĝenerala movado, ĉar tro malmultaj el ili havas eblecon legi la publikigaĵojn de U.E.A. Kaj nun oni demandas ĉu troviĝas bonkoraj norvegaj esperantistoj, kiuj bonvolas donaci abonon de la Jarlibro kaj la revuo Esperanto (kr. 50) al madagaskara samideano. Oni povas sendi la donacojn al N.E.L.

C. Stop-Bowitz.

LEGU

en ĉi tiu numero la apudan artikolon «Ĉu vi aĉetas Esperantoliteraturon?»!

LEGU

ankaŭ la recenzojn pri sep gravaj novaj libroj! Ni prezentas ĉifoje 4½ paĝojn da recenzoj.

LEGU

Esperantan literaturon! Riĉigadu vian spiriton kaj vian bibliotekon!

ELDONEJO ESPERANTO A/S
(Esperantoforlaget A/S)
Boks 942, Oslo 1.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de la redakcio: Hulderveien
17 B, Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20-a en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,00

Anonprezoj: ¼ paĝo kr. 150,00
½ p. kr. 75,00, ¼ p. kr. 38,00,
⅛ p. kr. 19,00.

Ĉu vi aĉetas Esperanto-literaturon?

Iam nia Eldonejo Esperanto A/S (Esperantoforlaget A/S) faris bonan negocon. Sed dum la lastaj jaroj la membroj tre malvigle aĉetadis librojn, tiel ke la jarkalkuloj de la Eldonejo eĉ montris deficitajn.

Kio povas esti la kaŭzo? Aperadas ja tre multaj bonaj, valoraj kaj interesaj libroj en Esperanto, kaj legado de bona literaturo estas ja ne nur plezuro, sed ankaŭ grava praktikado de la lingvo.

Kelkaj kluboj fakte neniam mendas librojn. Ili elektas komisiiton por la Eldonejo, kaj poste la Eldonejo neniam ricevas ian ajn mendon de la komisiito. Aliaj kluboj eĉ ne elektas komisiiton. Kompreneble ekzistas esceptoj. La klubo en Oslo aranĝas ekspozicion de libroj dum preskaŭ ĉiu kunveno, kaj tial la membroj tie vigle aĉetadas. Ankaŭ kelkaj, sed nur malmultaj, rektaj membroj vigle aĉetas librojn. Sed aliaj membroj eĉ ne unu libron aĉetas dum la tuta jaro.

Per anoncoj kaj recenzoj la membroj informiĝas pri la novaj libroj, kiuj aperas. Ofte oni pensas ke tiu aŭ tiu libro certe interesus min, sed se oni ne vidas la libron dum klubkunveno, eble mankas la iniciato por skribi al la Eldonejo mendante ĝin.

Mi opinias ke ĉiu klubo devas mendi stokon da libroj, ekspozicii ilin dum la kunvenoj, kaj tiel vendi ilin. Librojn, kiujn oni dum kelkaj kunvenoj ne vendis, oni re-

SCIIGOJ DE N.E.L.

La aŭtuna laboro. La liga Estraro insiste admonas ĉiujn klubojn kaj membrojn nun fari eksterordinarajn klopodojn por progresigi Esperanton en sia loko. Absolute ĉiu klubo kaj laŭeble multaj rektaj membroj devas nun starigi almenaŭ unu kurson. Se neniu loka esperantisto povas gvidi kurson, kolektu interesiĝantojn en studrondo, kiu povas lerni per la koresponda kurso; provu igi iun gazeton en via loko publikigi nian gazetan kurson. Vidu cetere la pasintan numeron de Norvega Esperantisto.

Taskotabelo por la kluboj. — *Okto-
bro:* La kluboj aranĝas kunvenojn por ĉiuj esperantistoj en la loko (ĉiuj, kiuj iam partoprenis kurson), laŭeble oni sendu invitilon al ĉiu unuope. La kunveno estu planita kun la celo (re-)membrigi ilin. Ĉirkaŭ la 24a de Oktobro ĉiuj kluboj aranĝas kunvenon dediĉitan al la tago de U.N. — Antaŭ la 15a la sekretario sendas al N.E.L. (kun kopio al la distrikto) raporton pri la 3a jarkvarono (blankedo A 10). La kasisto sendas al N.E.L. (kaj al la distrikto) kotizon kaj liston de novaj membroj kaj de eventualaj malfrue pagintaj malnovaj membroj. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

La 52a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Madrido, Hispanujo, somere 1968. Detaloj sekvas.

Raporto de la Liga Estraro pri la 2a jarkvarono. Oni okazigis 2 estrarkunvenojn kaj elsendis al la kluboj 2 ĉirkulerojn kaj programon de la kongreso en Sauda. Oni aranĝis prelegvojaĝon

sendu, petante aliajn. La komisiitoj devas vigliĝi, alie la Eldonejo baldaŭ devos fermi siajn pordojn.

Multajn librojn la Eldonejo havas, kaj ĉiujn, kiuj ne elĉerpiĝis, ĝi havigas. Dum la proksimaj monatoj vi trovos anoncojn pri la plej gravaj haveblaj libroj en nia gazeto. Studu tiujn anoncojn, riĉigadu vian spiriton kaj vian bibliotekon!

C. Stop-Bowitz.

de Itamar Even-Zohar al okcidenta Norvegujo kaj al Trøndelag. Al nia peto pri membreco la Norvega UNESKO-komisiono respondis ke ĝi ne trovis oportune plivastigi la membronombron nun. Oni havigis prezponon por laŭebla reapergo de Esperanto-nytt. Oni diversmaniere klopodis por varbi kongresanojn al Tel Avis, kaj poste al Rotterdam. La 40a Norvega Esperanto-Kongreso okazis en Sauda dum la Pentekosto (vidu raportojn en la pasinta numero). Oni klopodis subteni la proponojn de japanaj esperantistoj al la Unu Mondo-Kongreso en Oslo kaj havis bonajn kontaktojn kun la kongresa sekretario. Rerezentantoj de N.E.L. al la ĝenerala kunveno de Eldonejo Esperanto estis John Berggren, Signe Haug kaj C. Støp-Bowitz. Oni planis la aŭtunan agadon kaj decidis turni sin aparte al ĉiuj kluboj kaj distriktoj tiurilate. Oni diskutis apartan agadon inter norvegaj maristoj.

La Liga Estraro.

Pioniro forpasis

Ragnvald Rian

La 19an de junio 1967 s-ro Ragnvald Rian, Trondheim, mortis 76-jara, fidela kaj fervora esperantista koro ĉesis bati. Li estis unu el la ĉefaj pioniroj de la esperantomovado ne nur en Trondheim, sed ankaŭ en la tuta lando.

Li esperantistiĝis jam en 1906, kaj en 1911 li venis al Trondhjem, kie li tuj fariĝis prezidanto de Grupo Esperantista. De tiam li dum malfacilaj, same kiel en favoraj tempoj gvidis nian klubon per firma mano. De 1913 li estis delegito de UEA, kaj li estis ĉefdelegito por Norvegujo 1935—1957. Rian ankaŭ estis prezidanto de la Loka Ekzamena Komisiono en Trondheim, kaj lia lasta oficiala funkcio tiurilate estis cenzuri je supera ekzameno nur unu semajnon antaŭ sia forpaso.

En 1910 Rian subskribis la alvokon pri fondo de NEL, kaj li estis estrarano de NEL ekde 1911 preskaŭ sen interrompoj ĝis sia morto. Li estis ankaŭ sekretario de NEL (1913) kaj kunredaktoro de Norvega Esperantisto (1914).

Rian verkis kaj poste gvidis korespondan

Nils Økland 85-jara

Instruisto Nils Økland, Haugesund, estis 85-jara la 10an de junio. Li naskiĝis en Valestrand, Sunnhordland, en 1882, trapasis la ekzamenon ĉe la seminario en Stord 1902, fariĝis instruisto ĉe la Betania Orfejo, Stavanger, 1902—04, en Skåre apud Haugesund 1904—12, en Sveio, Sunnhordland, 1912—14 kaj en Torvastad sur Karmøy 1914—27. Økland estis gubernia lernejspektoro en Rogaland 1921—27, kaj de 1927 li estis instruisto ĉe la seminario en Stord. Li ankaŭ estis komunumestro en Torvastad kaj Stord kaj okupis diversajn oficojn en IOGT.

Økland esperantistiĝis printempe 1904 kiam li estis instruisto en Stavanger. Li tiam skribis al Haldor Midthus en Lysekloster kaj mendis esperantolibrojn, inter ili la lernolibron de Paul Nylén.

De 1905 Økland fervore propagandis, speciale inter la instruistoj. Li ofte skribis en la Esperanta gazetararo, kaj enpresigis multajn artikolojn pri Esperanto i.a. en «Norsk Skoletidende». En 1905—06 li gvidis kurson por gejunuloj en Haugesund kaj en 1918 por infanoj ĉe la seminario en Stord. Dum la UK en Dresdeno 1908 li partoprenis la fandan kunvenon de Internacia Asocio de Instruistoj, kaj en 1911 li estis kunfondinto de

kurson en Esperanto por bontemplanoj (Tr. hjem 1923). Plue li verkis Norvegan-Esperantan Vortaron (Tr. heim 1932), Esperantan-Norvegan Vortaron (Oslo 1949) kaj denove Norvegan-Esperantan Vortaron (Oslo 1963). La lastan vortaron li verkis en kunlaboro kun Erling Anker Haugen.

Pro lia grava kaj valora laboro por Esperanto UEA nomis lin honora membro en 1948, kaj li estas la sola norvego, al kiu UEA donis tiun distingon! Honora membro li estis ankaŭ de NEL (1949) kaj de Grupo Esperantista (1952). En 1951 NEL nomis lin Komandoro de la 1a klaso de PRO MERITO, kaj en 1964 li ricevis la Grandan Krucon.

Rian estis ankaŭ bona ŝakludanto kaj multjara membro de IOGT. Plue li estis tre bona pianisto, kiu per sia muziko multe kontribuis al la agrabligo de la klubkunveno.

Kun humilaj dankoj ni kapklinas memorigante meritplanan pioniron de Esperanto.

Li ripozu en paco!

LKH

Tutmonda Esperantista Bontemplana Asocio dum la UK en Antverpeno.

Li estis membro de NEL ekde la fondo en 1911 kaj estis ĝia vicprezidanto en 1916—13. En Haugesund li estis delegito de UEA 1925—26 kaj en Stord 1927—36.

Økland estas eble hodiaŭ la sola norvega esperantisto, kiu interparolis kun la Majstro mem. Tio okazis dum la UK en 1911. Økland rakontis, ke Zamenhof «estis bela, bona viro kaj tre modesta. Li havis tre afablajn, mildajn okulojn kaj ĉiam parolis en tre trankvila maniero. Mi interparolis kun li iun kongresan tagon kiam mi havis la plezuron helpi lin kaj lian edzinon trovi la vojon al la preĝejo.»

Ni tutkore dankas al nia pioniro kaj sendas niajn plej sincerajn bondezirojn kaj varmajn gratulojn!

LKH

Johan Snekvik

Tramisto Johan Bernt Snekvik, Oslo, mortis la 13an de majo 1966. Li naskiĝis la 15an de decembro 1887 kaj esperantistiĝis aŭtune 1927 pere de kurso, kiun A. Stensrud gvidis por tramistoj en Oslo. Post la kurso Snekvik iniciatis la fondon de «La Tramista Klubo», kiu fondiĝis kun 19 membroj la 22an de marto 1928. Snekvik estis ĝia prezidanto ĝis la malfondo en 1940.

En 1928/29 li estis estrarano de NALE (Norveglingva Asocio de Laboristaj Esperantistoj), kaj dum pli ol 15 jaroj li estis estrarano de Esperantoforlaget A/S. Snekvik petis pri ekzamenado en 1965. Li ankaŭ verkis la libron 52-paĝan «Kiu estas Li?» (Oslo 1957).

Snekvik estis fidela esperantisto, kaj ni eldiras benon super lia memoro!

LKH

KLUBA JUBILEO

Grupo Esperantista de Trondhejmo estas 60-jara la 15-an de septembro. Ni gratulas!

AŬTUNAJ FERIAJ KURSOJ

15.—21. de okt. en Århus, Danlando, invitas vin veni por ĉeesti. Belega altlernejo en interesa loko. Prospekton sendas senpage al vi

L. FRIIS,
Ingemannsvej 9,
Åbyhøj, Danlando.

Brynhild Østmo 70-jara

La 17an de Julio Brynhild Østmo, Oslo, fariĝis 70-jara. Kiu kredus tion? Sed efektive estas vero. Ŝi estas multjara estrarano de Klubo Esperantista de Oslo, kaj ŝi estis membro de la L.K.K. de la kongreso en Oslo en 1952, kie ŝi i.a. perfekte zorgis pri la loĝigado de la kongresanoj. Sed plej konata «Bobby» estas kiel la «Direktorino de la gajeco», lertege ŝi aranĝas ĉion, landajn kunvenojn aŭ kongresojn, festenojn, teatraĵojn, kantgrupojn, ludojn k.t.p. senfine. Kvankam iomete postfeste ni kore gratulas al ŝi, dezirante grandajn fortojn por multaj pliaj aranĝoj dum la jaroj venontaj.

Amiko.

La printempaj ekzamenoj

Elementa ekzameno en junio 1967.

DIKTAĴO

En New York / viro ĵus koliziis / kaj rompita la klaviklon / Unu el la plej konataj hirurgoj / de la branĉo / operaciis la viron / en aŭditorio plena / de medicinaj studentoj. / Kiam la viro vekigis / post la anestezo, / li rimarkas, / ke krom la bandaĝo / sur la ŝultro / li havas bandaĝon / ankaŭ ĉirkaŭ la ventro. / Li sonorigas, / kaj venas la «fratino». / «Mi nature komprenas / la bandaĝon ĉirkaŭ la ŝultro, / sed kial mi ricevis / bandaĝon ankaŭ / ĉirkaŭ la ventro?» / «Jes, tion mi rakontos al vi,» / respondis la fratino. / «Kiam la profesoro / finis la operacion, / la studentoj laŭdis lin / per aplaŭdo tiom, / ke li prenis / la apendicon / kiel ekstran numeron.»

Klaviklo = kragebein
Anestezo = bedøvelse
Apendico = blindtarm.

Elementa ekzameno en junio 1967.

TRADUKAĴO

Ikke nå lenger . . .

En godseier hadde noen råtne (1) og farlige trær på jordene sine. Han annonserte derfor etter en erfaren (2) tommerhogger. En gammel mann med trebein kom og ville

ha arbeidet. Han så ikke ut til å være sterk nok.

«Er du sikker på at du kan gjøre et slikt arbeid?» spurte godseieren ham *vilende* (3). «Disse trærne er store og farlige.»

«La meg fortelle deg,» sa mannen, «at jeg har felt trær i mange skoger, alle steder i verden, i Canada, New Zealand, Sahara, Burma . . .»

«Stopp et øyeblikk,» sa godseieren, «du sa Sahara. Det er ikke skog der.»

«Nei,» sa mannen, «ikke nå lenger . . . ikke nå lenger.»

- 1) å råtne = putri
- 2) erfaren = sperta
- 3) å tvile = dubi.

Supera ekzameno en junio 1967

TRADUKAĴO

Engelskmannen og løva i ørkenen.

En engelsk turist gikk seg vill i Sahara, og da man fant ham igjen med smertende føtter, tørst og sulten, var han helt utmattet etter fire døgn slit. Etter at han var kommet tilbake til England, samlet man seg naturligvis rundt ham som midtpunktet i klubben. Han fortalte da meget gjerne hva han hadde gjennomlevet i disse fryktelige dagene.

Den tredje dagen, fortalte han, var den aller verste. Uansett i hvilken retning jeg så, var det bare sand, ikke et tre, ikke en busk, ikke et grasstrå. Helt fortvilet satte jeg meg ned for å hvile, men da fikk jeg plutselig se en ørkenløve ikke langt fra meg, og jeg kan forsikre dere om at den så sulten ut. Jeg greide å reise meg på beina og begynte å løpe det forreste jeg kunne. Jeg var dog så utmattet at jeg snart hadde løva like i hælene på meg.

De siste kreftene brukte jeg til å klyve opp i et tre.

Ja men, avbrøt en av tilhengerne, du sa jo for noen minutter siden at det ikke eksisterte trær der, heller ikke busker og gras.

Men hva skulle jeg gjøre da? svarte den reddede.

*

LETERVESPERO!

Entuziasmaj geesperantistoj organizos letervesperon la 21. oktobro 1967. La celo de la letervespero: varbi novajn geesperantistojn kaj entuziasmigi la gekomencantojn! La adreso: Maria Vitályos, Tirgu Secuiesc, Garü 11, Reg. Brasov, Rumanio.

RECENZOJ

ADIAŬO DE BAGHY

Julio Baghy: Ĉielarko. Antologio de fabeloj originale en versoj reverkitaj. STAFETO: Beletraj Kajeroj 27, J. Régulo, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1966. 112 p., broŝ. Prezo: 1,20 us. dolaroj.

Mallonge antaŭ sia morto, la aĝa poeto ricevis inter siaj manoj sian lastan libron. «Ĉielarko» ne estas granda libro, sed ja grava libro. Grava ĝi estas ne nur, ĉar ĝi estas verko de Baghy, kaj lia lasta, kvazaŭ lia testamento, sed ankaŭ ĉar ĝi prezentas ion tute novan en nia literaturo. Malsana kaj maljuna, Baghy sukcesis fosi novan sulkon. «Ĉielarko» estas antologio de 12 fabeloj elektitaj el la fabelaroj de 12 popoloj, sed ne simple versigitaj fabeloj. Baghy mem emfazas, ke ne la fabelojn mem, nur iliajn *temojn* li elektis, kaj kie la originala fabelo estis tro bildomanka aŭ epizodanemia, lia fantazio kree forigis tiujn mankojn.

Mi scivole eklegas la libron, pri kiu la maljuna bardo diris, ke ĝi estu por liaj geamikoj «nura paĉja» danko por konsola amo kaj dorlota simpatio. Mi eklegas scivole, sed mi plulegas entuziasme, frande. Kia riĉo! Nia Esperanto ja estas fleksebla kaj posedas grandan vortofaran povon: per la plumo de Baghy ĉio fariĝas mirige facila, mirige bela, kvazaŭ fandita en perfekta muldujo. Kaj oni devas admiri la junan animon de la aĝa Baghy — pri juna amo li kun prefero baladas:

Uraŝima mire staris, ne respondis;
en li amo ŝtorme, sangovipe ondis.
Ŝi ja estis fable korpiginta, Belo,
okulpato ŝia por li la ĉielo,
lin sur lipoj ruĝo de l' koralo logis,
flato pri kiso per ridet' prologis.

Ni ĝuas la versmuzikon, kies apogeo estas la enkondukaj linioj de la ĉina fabelo:

La laga lazuro
lante lulante
balancas lotuson lunluman . . .
Silksona susuro
sente silente
suspiras spir-kison parfuman . . .

Kaj ĉi tiuj linioj ĉe la fino revenas en renversita ordo, fermante la luksan kadron de la kortuŝa rakonto.

Lertaj internaj rimoj en mallongaj linioj plifortigas la prezenton:

Siaj ondaj haroj blondaj
brilis kiel oro,
en sereno de l'mieno
montris sin pudoro,
sur la vango pentris sango
rozon al lilio,
ŝia ĉarmo estis varmo,
suna harmonio.

Kaj atentu, kiel terura fariĝas la drako per lia sonpentraĵo:

Sed vekigis, ve, la drako
kun terskua brua krako.
Ĝi ekiris flam-anhele
lin dismordi tuj kruele,
plaĉe maĉi, kaĉe gluti,
el naŭ buŝoj ostojn sputi . . .

Oni emas citi multe pli, la tuta libro estas citinda, sed la supraj frandaĵoj sufiĉu por rekomendi grandan malgrandan libron.

La listo de postkorektoj ne enhavas pli ol la duonon de la preseraroj, kiuj tamen ne multe ĝenas. La prezento kaj la tipografio estas tre plaĉaj. Nova brila perlo sur la stafeta ŝnuro — ni nur ege bedaŭras, ke la aŭtoro ne plu havas eblecon legi la entuziasmajn recenzojn.

JHR.

FOSITAJ SULKOJ

Vilho Setälä: Fortoj de l'Vivo. (La movado, literaturo originala kaj tradukita, la lingvo, scienco kaj teknikoj), riĉe ilustr. (120 fotoj kaj desegnaĵoj), Eld.: Fondumo Esperanto 1967, 208 p., Prezo: broŝ.: 32 steloj, bind.: 60 steloj.

Persone mi konatiĝis kun Vilho Setälä en Uddevalla 1946, kaj — permesu al mi tuj fari parentezon — tie mi fotografis lin kune kun Ferenc Szilágyi kaj Einar Adamson. Tiu foto staras en la recenzata libro p. 196, kun informo, ke ĝi estas farita en Frostavallen 1956, kio do estas malĝusta! Neniu sciis tiam, ke la fotografinto kaj du el la fotografitoj sidu kune en redaktantaro de kultura revuo, sed — la fotografinto jam sciis, ke Setälä kaj Szilágyi estas du veraj kulturfortoj.

Jus unu el ili fariĝis 75-jara (kion oni ne povus kredi) kaj samtempe estas 60-jara

esperantisto (kion li devas nepre esti laŭ la amplekso de tio, kion li faris por Esperanto.) Ĉi tiu libro estas eldonita por honori Vilhon Setälä okaze de la du menciitaj jubileo, kaj nura trafoliomado de la libro povas konvinki kiun ajn, ke li tion vere meritis.

«Fosu vian sulkon!» skribis Setälä en la memorlibro de la juna studento, kiun li tiom imponis en Uddevalla antaŭ 21 jaroj. Tiu, kiu vere fosis la sian, estas ĝuste Setälä. Mi havis la okazon tion vidi en lia hejmo, dum esperantistaj kongresoj kaj kunvenoj, en liaj artikoloj, en konversacioj. La saman impreson fortigas la libro, pri kiu ordinara recenzo ne estas ebla. La libro estas multfaceta bildo pri la multaj sulkoj fositaj de Setälä, tiom multfaceta, ke ĝi tuj ekbrilas je la unua malfermo. La brilojn intensigas la multaj fotoj faritaj de Setälä mem — ĉar li estas vere majstra fotografisto (ĉu vi vidis la libron «Burĝonoj»? Domaĝe, se ne!)

«Fortoj de l'Vivo» mallonge estas digna honorigo al digna gratulindulo.

JHR.

NUR UNU JUDINO

Jan Otčenášek: Romeo, Julieta kaj la tenebro. Romano, trad. el la ĉeĥa lingvo Vladimír Váňa. Prologo de Louis Aragon. Eld.: STAFETO, La Laguna de Tenerife, 1965. Beletraj Kajeroj 26. 176 p. broŝ.

Sur la kovrilo oni prezentas la porteton de la aŭtoro kaj mallongan biografion — kaj mi devas kun bedaŭro konstati, ke nek la simpatia vizago, nek la verkoj menciitaj estis al mi kontaj. Eĉ la nomon Otčenášek mi ne konis. Sed nun mi konas lin, kaj kiam mi denove vidos libron, kiu portas lian nomon, mi legos ĝin, se ĝi estas traduko en iun ajn lingvon, kiun mi scias legi. Bedaŭrinde mi ne legas la ĉeĥan, kaj tion mi bedaŭras nun pli ol antaŭe, renkontinte Otčenášek.

Mi havas nun la ĉiam revenantau okazon konstati, kiom valoras la Internacia Lingvo por diskonigado de literaturaj verkoj el malgrandaj lingvomedioj.

Denove STAFETO aldonas perlon en la ĉeno de valoraj tradukoj. Kaj kiam mi nun diras «valoraj tradukoj», tio havas duoblan sencon. Ĝi signifas bone faritan tradukon, kaj ĝi signifas tradukon de valora literaturaĵo.

La Esperanta lingvo de Vladimír Váňa estas riĉa kaj esprimkapabla, sukcesas streĉi la atenton de la leganto, kiel ja faras la

enhavon de la libro. Kelkaj neologismoj estas — ni ne diskutu ĉi tie, ĉu necesaj aŭ ne — kvarona cento estas listigita en utila glosaro ĉe la fino. Same la plej multaj preseraĵoj estas listigitaj, cetere neniu ĝenaj.

Bona libro, diras Aragon ĉe la fino de la prologo, estas tiu, post kies legado oni longe revas, kaj pri kiu oni pensas. Prave. «Romeo, Julieta kaj la tenebro» estas tia libro. La elvoka titolo aludas junan amon kaj malfacilan medion: la historio okazis dum la germana okupado de Prago, kaj la du junaj homoj estas juda knabino kaj nejududa knabo — ambaŭ gimnazianoj —: la knabo sukcesas kaŝi la persekutitan knabinon en malplena ĉambro en tre plena domo. En nia lando ni travivis tiun malfacilan epokon, kaj povas senpere kompreni la malfacilaĵojn, la necesajn mensogojn, la forŝteladon de manĝaĵoj el jam tro malgrandaj provizoj, la timon. Ĉio estas vive redonita, kaj la homoj de la romano estas veraj homoj. Iel la libro havas la etoson de la «Taglibro de Anne Frank», kio eble ne estas tre stranga, sed kio povas esti kroma rekomendo.

JHR.

EL LA NORDA FINNLANDO

Eija Salovaara: Kie boacoj vagadas. 72-paĝa, broŝurita. Eldonis: Dansk Esperanto-Forlag, Åbyhøj, 1967.

Finna verkistino simple rakontas per 9 rakontoj krom antaŭparolo kaj epilogo pri la norda Finnlando, la Laplando. Sajnas al mi, ke la nocio «novelo» estas tro pretenda al la rakontoj, kiuj ne enhavas la karakterizaĵojn de novelo. Sed ili estas simplaj, facile legeblaj kaj sufiĉe interesokaptaj rakontoj; kaj al mi, kiu dum jaroj loĝis en la norda Norvegujo, ili povis krei preskaŭ nostalgieton. Espereble ili do povas al aliaj krei la deziron viziti tiun fabeloplanan kaj sorĉan nordon.

Plejĉarma sendube la rakonto «La Reĝino de Laplando» estas — kaj tiun ĉi mi ne hezitus nomi novelo. Ĝi enhavas la tuton, la simplan rakonton, la interesohavan kaj atentokaptan intrigon, kaj la vere surprizigan finan turnon.

La libron karakterizas eleganta lingvo, kiu ne estas ŝarĝita per troaj neoftaj vortoj kaj fremdaj kaj komplikitaj turnoj, kaj ĝi tial estas legebla de komenculoj. Du neologismoj enestas, kaj mi devas meti demandosignon je ambaŭ: «fjelo». Piednoto diras: speciala speco de norda arktika monto, la ĝusta vorto

mankas en Esperanto sed estas ekz. en la nordaj lingvoj. Mi uzas la demandosignon, ĉar ni ja ankaŭ havas aliajn: pigg, hø, tind, ås, kaj multajn aliajn. Ni ne povas al ĉiu krei novan esperantan vorton. La alia estas esperantigo de geografia nomo Österbotn al Ostrobotnio. La nomo neniel rilatas al la moluska ostro, sed al la direkto oriento. Krome la dana presejo povus al la norvega urbonomo Tromsø uzi ø kaj ne ö.

Haro.

ARGENTINA EPOPEO

José Hernández: Martin Fierro. Tradukis: Ernesto Sonnenfeld. 288-paĝa, bindita. Eldonis: Stafeto.

Kiam Stafeto silentas dum longa tempo, la esperantistaro miras. Kiam nova libro do aperas, la tuta esperantistaro esperas je io vere bona.

Kaj la silento estas interrompita per tiu ĉi libro, kiun ni ne konas el norveglingva traduko, kiu do denove donas al ni la privilegion penetri en fremdan, valoran literaturon, al kiu aliaj norvegoj ne povas atingi.

Temas pri epepeo el Argentino. En la monda literaturo ĝi rangas inter la plej valoraj, kune kun Kalevala, La Tragedio de l' Homo, Dia Komedio, Faŭsto, Sinjoro Tadeo — kaj nia propra Peer Gynt, ĉiuj el la plej valoraj tradukoj kiujn posedas la internacia lingvo.

Oni povas demandi, kial tia eposo el la mond-literaturo ne estas tradukita al nia nacia lingvo. La klarigo certe estas, ke la tasko estas tro malfacila. La tradukinto mem en sia antaŭparolo diras: «Martin Fierro (elparolu Fjerro) prezentis apartan problemon: la originalo estas almenaŭ parte skribita en dialekto de kampuloj.» Kaj krome en poezia, ligita formo kun ritmo kaj rimo, en ne malpli ol 1191 strofoj. Denove la internacia lingvo montris la eblecojn tradoni eĉ la plej malfacilan, pro sia propra fleksebleco. Sed — por atingi sian celon — la tradukinto devis kelkfoje uzi perforiton. Ankaŭ tion li konfesas en la antaŭparolo: «Certloke mi diftongigis la sonon i je j, eks.: majzo, bataljono, pjedo, manjero, djablo ktp. Mi tion faris, ĉar ŝajnis al mi ke kiam Esperanto fariĝos pli vaste parolata, tia diftongigo en la ĉiutaga paolo tre verŝajne fariĝos komuna afero.»

La libro prikantas gaŭĉon, t.e. la tutspeciala sudamerika vagabonda kampulo kiu

gajnis sian panon per gardo de la grandegaj brutaroj, sed kiu ankaŭ — se necese — uzis ne tute legalajn manierojn por havigi al si la ĉiutagajn bezonataĵojn. Certe — tiuj ne estas grandaj kaj multaj. Li vivas sian vagabondan vivon sur la ĉevalodorso, do nek povas nenik volas kunporti multajn aĵojn.

Se li mem foje ribelas kontraŭ leĝoj kaj dekretoj, tiuj ankaŭ ne estas mildaj al li. Perforte oni devigas lin iri al la ĉiama milito ĉe la limoj, kie ili — preskaŭ sen pafiloj kaj municio, kaj tute sen iu ajn ekzercado — devas kontraŭbatali la sovaĝajn tribojn dum ili atakas, kaj flegi la oficirojn dum la pli pacaj periodoj. Kaj dum tiuj periodoj, kompreneble, ili ne rajtas porti la pafilojn. Oni ja timas ribelon! Hejmenvenante, la gaŭĉo Martín trovas, ke la tuta familio estas for. Ĉar li mem forestis, neniu havigis al ili gajnon, kaj

Je forir' mi tie lasis
brutojn, tutan apartenon,
ja baldaŭan la revenon
la juĝist' promesis certe,
zorgus intertempe lerte
la edzino la bienon.

Poste — laŭ najbaraj diroj —
kampon ili elpretendis,
la brutaron ili vendis
por la pag' de l' luoprezo.
Multon ili ekinventis!
Ĉion kovris la forgeso.

Oni asertas, ke la tipa gaŭĉo ne plu ekzistas. Tio ja certe estas bone. Sed ankaŭ estas vere bone, ke li ankoraŭ vivas kaj ekzistas — en tiu ĉi libro. Kvankam ne facile alirebla pro la poezia formo, en kiu la ritmo subite povas ŝanĝi, tiu ne pentas, kiu ĝuis la verkon ĝis fino.

Mi ne povas kompari kun alia traduko, kaj nepre ne kun la originalo. Tial mi ja ne povas juĝi la tradukon kiel ĝi meritas esti juĝata. Sed mi jam konas sufiĉe de nia esperantlingva literaturo, kaj legis sufiĉe multajn recenzojn kun laŭdaj vortoj, ke mi al tiu ĉi libro nepre devas uzi la plej fortajn glosojn de la vokabularo. Ĝi ne nur estas leginda, ĝi estas legenda. Kaj ne nur havinda — havenda. La esperantisto, konscia de la avantaĝoj de la internacia lingvo, en tiu ĉi libro trovas veran perlon, al kiu ĉiam li povas montri: Jen — nia lingvo ne nur estas viva lingvo, sed ĝi donas al ni kion la nacia lingvo ne povas doni!

Hans Amund Rosbach.

BONEGA HIMNARO

Cent himnoj, en traduko de Hans Amund Rosbach. Propra eldono. 1966. 61 p. ilustrita. 14,5 x 20,5 cm. Prezo: kr. 10,00.

Jus aperis belaspekta kajero, nova Esperanta himnaro evangelia en traduko de pastro Hans Amund Rosbach. La bezono de taŭga himnaro estas granda, ne nur en la hejmoj kaj lernejoj, sed ankaŭ dum la diservoj de la Universalaj kongresoj aŭ dum aliaj Esperantaj kunvenoj. Kaj «Cent himnoj» vere taŭgas, ĉar ĝi enhavas himnojn por ĉiu dimanĉo de la tuta eklezia jaro. Honoron al la tradukinto!

Preskaŭ 80 el la 100 himnoj troviĝas en nia reviziita himnaro de M. B. Landstad, kaj multajn el niaj plej karaj himnoj ni tuj rekonas, kiel: «Lover Herren», «Kirken den er et gammelt hus», «Velt alle dine veie», «Jesus lever, graven brast», «Påskemorgen slukker sorgen», «Med Jesus vil eg fara», «Herre Gud, ditt dyre navn og ære», «Overmåde fullt av nåde» ktp. ktp. Sed bedaŭrinde la originalaj titoloj de la himnoj ne estas indikitaj en la himnaro.

Estas evidente, ke la himnoj estas tradukitaj rekte de la originalaj tekstoj, ĉar pluraj himnoj havas multe pli da strofoj ol kutime en niaj norvegaj himnaroj kaj kantaroj.

Inter la himnoverkistoj ni trovas 21 norvegojn, 11 danojn, 6 germanojn, 3 svedojn kaj 1 skoton, italon, finnon kaj anglon. Blix estas reprezentita per 12 himnoj, Landstad kaj Grundtvig per 6, Kingo per 5, Brorson, Nordahl Brun, Jonas Dahl kaj Hovden per 4, Ingemann kaj Wallin per 3 kaj Dass, Gerhardt, Luther, Orheim, Støylen kaj Wexels per 2 himnoj. Je la fino de la himnaro oni trovas tabelojn pri la himnoverkantoj kaj komponistoj kun mallongaj biografiaj notoj.

La papero estas bona, la preso klara kaj plaĉa, la tri ilustraĵoj tre belaj, la himnoj tre kanteblaj kaj la lingvaĵo bonega. Tamen ne plaĉas al mi la troa uzo de difina artikolo antaŭ la posedpronomoj: «Ho Patro, per la Via vort'». Zamenhof kelkfoje uzis similajn esprimojn, sed li ĉiam metis la posedpronomon post la substantivo: «Eraras for la penso mia».

La himnoj estas ordigitaj laŭ la dimanĉoj de la eklezia jaro, sed la nomoj de la dimanĉoj estas jen en Esperanto (Palma dimanĉo, Sankta Jaŭdo, Dimanĉoj post Trinitato) kaj jen en latina lingvo (Reminiscere, Quasi-

modo geniti, Exaudi). Kelkfoje la latinaj nomoj estas erare skribitaj (Invoĉavit, Okuli, Lätare, Judica, Miserikordiar domini, Jubilate, Kantate). Kial ne uzi nur Esperantajn nomojn en Esperanta himnaro? En ĉiuj fakoj ni nun klopodas por krei Esperantajn terminojn, kaj jen devus esti bona ŝanco por krei Esperantonomojn por ĉiu dimanĉo de la eklezia jaro.

Preseraroj preskaŭ ne ekzistas. Mi notis nur: feliĝegaj (n-ro 5), mirrho (12), Lia anstataŭ Li (20), masuprenvenas (22), hĵemo (22), ĉisu anst. ĉizu (38), okula anst. okulo (86) ne anst. ni (100). Pluraj apostrofoj mankas, kaj elfalis la indiko «Melodio de Ph. Nicolai» (75) kaj (1884—1958) post Matias Orheim. Fine la nomoj de multaj aŭtoroj estas erare skribitaj (Gerhard, Ingeman, Nordal Brun, Bjornsson, Tomas Kingo, Peter Dass, Friedrichsen, Gasman ktp.)

Konklude: La himnaro estas bonega. Ni aĉetu ĝin, kaj ni kantu la himnojn. La himnoj estas belsonaj kaj ĝojigas ne nur la spiriton, sed ankaŭ la orelon.

Por uzo ekster nia lando melodiario estus dezirinda.

LKH

ATA/ITA

K. Kalocsay: Vojaĝo inter la tempoj, La Laguna, 1966 (Eldonejo Stafeto), 197 paĝoj. Prezo ne indikita.

Ĉi tiu ampleksa libro estas nova traktajo de la verbosistemo en Esperanto kun celo pravigi la vidpunkton de la «aspekta» («ita») sistemo. La aŭtoro esperas ke lia traktajo «estus akceptita kiel finofara lingvistika esploro» (p. 194), kaj utiligas tiucele ĉiujn eblajn konvinkmetodojn. Ni tuj diru ke tiu temo necesigas multe pli da spaco ol la kadro de recenzo permesas, kaj tial mi limigu min al nur kelkaj rimarkoj. La kerno de la diskuto estas inter du malsamaj konceptoj pri la eblaj funkcioj de verbosistemo ĝenerale, kaj estas tute klare, ke tiusence la aŭtoro, vole-ne-vole (kiel ni ĉiuj) estas viktimo de lingvaj kategorioj al kiuj li alkitimiĝis de aliaj lingvoj (eĉ se ne estas la gepatra). Li ja deklaras «science» trakti la problemon, sed lia verko ne estas «scienca» eĉ laŭ la plej eksteraj kriterioj: li ne konsultis (almenaŭ laŭ la manko de bibliografio) iun lingvistan studon de ĉi tiu problemo. La literaturo pri ĝi, nome la aspekta kontraŭ

la tempa organizo de la lingva verbosistemo, estas jam grandega. Oni laŭ ĝi povas ĝenerale konstati la jenon: la diferenco inter la diversaj lingvoj tiurilate estas tre granda, eĉ inter parencaj lingvoj. Plue, la verbosistemo — kiel aliaj lingvaj struktureroj — siavice diktas la mensan percepton de la eksterlingva fenomenaro. Oni sekve eĉ povas dubi pri la efektiva taŭgeco de la aspekta/tempa analizo, ĉar ververe la verbo ne rilatas al tiuj senmediece. Tamen, por la nura manipulebleco (kiu ja estas la sola bazo de ĉiuj homaj sciencoj, eĉ kiam la sciencisto rekonas pri la teoriaj dubindaĵoj) la tempa/aspekta kategoriigo estas almenaŭ provizore konvena.

La lingvo-historiaj traktajoj, kiuj uzis ĉi tiun kategoriigon, montris tutklare la tendencon de la diversaj lingvoj pasi de «aspekta» al «tempa» verbosistemo kaj esprimi la aspektojn per ne-verbaj formoj. Tiu estis, ekzemple, la procezo de la antikva lingvogrupa ŝemida. La Akkada (Babilona-asiria) lingvo estas pure aspekta, kvankam pli malfruaj stadioj tendencas indiki ankaŭ okazajo laŭ temposkalo. La Hebrea lingvo montras grandan parencon kun la akkada verbosistemo, kaj la lingvistoj kredas ke la biblia verbosistemo ankoraŭ fakte spegulas aspektan stacion, sed kiu poste absolute forgesiĝis. Pli novaj stadioj de la Hebrea estas, jam de la 1-a jarcento antaŭ nia erao, pure «tempaj». Same la moderna Hebrea, nun parolata en Israelo. Ankaŭ la modernaj arabaj dialektoj (parencaj kun la Hebrea kaj la Aramea) kreis formojn novajn por pli precizaj tempindikoj. Esperanto, eĉ laŭ la «aspektistoj», estas pure tempa en tiu senco, ke la verbo ne indikas iun manieron de la ago, nek daŭron, sed nur rilatojn de antaŭ/post sur orda-direkta skalo. (La strukturo de la t.n. «tempo-organizo» estas konstruita laŭ ordo, t.e. malsimultaneco, kaj direkto, t.e. sekveco, dum la strukturo de la t.n. «aspekto-organizo» estas konstruita laŭ daŭro/maniero/rapideco.). La aspektistoj ne pridubas tion, sed tamen volas konsideri ata/ita kiel escepton, dum la «tempistoj» postulas konsekventan simetrian.

Estas tute kompreneble, ke tiuj kiuj alkitimiĝis al la aspekto-sistemo, ne povas facile cedi pri ĝi, sed ankaŭ male! En ĉi tiu, kiel en aliaj paragrafoj, la Esperantistoj simple tradukis de siaj propraj lingvoj. Tion tuj rimarkas ĉiu kiu ne apartenas al la hind- (Daŭr p. 92.)



FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA
FERVOJISTA ASOCIIO — NEFA

Redaktoro: Odd Kolbrek, Kallbakkstubbten 22,
Oslo 9

La 19a kongreso de IFEF, Germanujo 6.-12. mai 1967

Dimanĉmatene, post katolika kaj evangelia diservoj en Esperanto, okazis la solena kongresinaŭguro per la prezidanto de IFEF, s.ro De Jong, kaj la prezidanto de LKK, s.ro Giessner.

Rimarkinde estas ke tiu ĉi kongreso okazis en la kadro de FISAIC, dum la ĉeestado de ĝia prezidanto, s.ro Schlessler, kiu salutparoladis.

Parolis ankaŭ reprezentantoj de la Ĝenerala Direkcio de la Germanaj Fervojoj, de la fervojistaj sindikatoj, la vic-urbestro de Fulda, la direktorino de Centra Oficejo de UEA, f.ino Vermaas, kaj fine salutis la reprezentantoj de la diversaj landoj.

D.ro Werner Borman de la Universitato de Hamburgo, kiu estas prezidanto de GEA,



Grupo de diversnaciaj fervojistoj en siaj uniformoj, dum la solena inaŭguro de «Esperantostrasse» en Fulda. La norvega reprezentanto, Per Johan Krogstie, estas n-ro 2 de mald-
ekstre en la unua vico.

festparoladis, la temo estis «Mondtrafiko kaj mondlingvo».

Inter la multaj bonegaj kulturprogramoj, kaj amuzaj programoj, speciale menciinda estas la teatraĵo: «Ĉu vi konas la laktovojon?», kiu estas montrita inter alie en Nationaltheatret en Oslo.

Brila festo estis la balo, agrabla kunestado estis la bankedo, agrabla estis la amuza vespero, kune kun ne-esperantistaj gekolegoj de Fulda. Okazis ankaŭ piedpilk-maĉo inter taĉmentoj de IFEF kaj fervojistoj de la kongresurbo, koncertoj kaj de blorhestroj kaj virhoros, kaj neforgesebla estas la prezentado de romanoj, fare de la solkantistino Anni Wiesmann, la kantisto Horst Neumann, kun Albrecht Wiehl ĉe la piano. Okazis originala procezio tra la urbo, sub gvidado de du fervojistaj blorhestroj. Estis la samaj uniformvestitaj trajnekspedistoj kaj trajnĉefoj de la Interkona Vespero, kiuj marŝis al strato, kies nomo oficiale ek de tiam fariĝis Esperantostrasse.

Ankaŭ la urbeto Hilders/Röhn ricevis sian Esperantostrasse, dum vizito tie de la gekongresanoj.

El fervojfaka vidpunkto la 19a kongreso estas unika, kun vizito en la fervoja riparejo, kie oni rekonstruas varvagonojn, kaj preparas la transiradon al centra bufrokuplilsistemo, kiu post kelkaj jaroj enkondukigos en la tuteŭropa fervojreto.

La du fakprelegoj, unu pri «Skrabaj ordoj al trajnoj kaj substitutaj metodoj» (kiu montras kiel fervojistoj en 11 landoj laboras), la alia sub la titolo: «La aŭtomata trajnbremisigo», okazis ambaŭ kune kun akompanaj lumbildoj.

Per Johan Krogstie.

ATA/ITA

eŭropa lingvogrupo, kiel mi (kies gepatra lingvo estas la Hebrea). Tamen, Esperanto multe pli internaciigis ol en la komenco, dank' al natura evoluo kaj malsamaj influoj. Ŝajnas, ke teoria rezonado, kaj certe ne devigaj rimedoj, ne povas solvi la problemon, sed nur la libera uzo de la lingvo. La libro de Kalocsay estas certe legitima, sed laikoj estu singardemaj, ĉar ne temas pri ia vera lingva analizo, sed pri polemiko. Kalocsay apartenas al la filologia-gramatika tradicio, sed la moderna lingvoscienco jam

Informoj de la Ekzamena Komisiono

Ekzamenoj plenumitaj. Dum Junio 1967 superan ekzamenon sukcese plenumis en Oslo Kristian Mortensen, Aslaug Refsing, Jørn Selstad, en Trondhejmo Odd Wågbo, kaj elementan ekzamenon sukcese plenumis en Haugesund Steffen Kjetland, Lovise Sortland.

Ordinaraj aŭtunaj ekzamenoj. Ekzameno okazos ĉirkaŭ la 1-a de Decembro 1967. Instruistan ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sauda, Tromsø kaj Trondhejmo. Oni anoncu sin sur la presitaj skemoj riceveblaj de la lokaj ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, *antaŭ la 1-a de Novembro*. Personoj, kiuj faros la ekzamenon ne en Oslo, plenu po 2 — du — skemojn. *Plenu la skemojn precize kaj komplete! — Aligiloj, kiuj alvenos post la 1-a de Novembro, ne estos konsiderataj.*

Jenaj helpiloj por sinpreparado al ekzamenoj estas aĉeteblaj ĉe la Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo 1, poŝtgirokonto 100.34:

Ekzercaj taskaroj: Kajero I: traduktaskoj por elementa ekzameno. Kajero II: diktaĵoj por elementa ekzameno, Kajero III: traduktaskoj por supera ekzameno kaj taskoj por instruista ekzameno. Prezo por unu kajero: kr. 1,00 + afranko.

Vortlisto por Adi: La Forto de l' Vero, kr. 0,50 + afranko.

Ekzamena Regularo kun ekzamenaj programoj kaj konsiloj pri lernolibroj kaj literaturo, kr. 0,50 + afranko.

Notu ke ĉi tiujn helpilojn oni aĉetas ĉe la Ekzamena Komisiono.

Ekzamena Komisiono de N.E.L.

C. Stop-Bowitz

delonge trovis pri taŭgajn metodojn, kiu tamen estas priskribaj kaj ne normodonantaj. Tiuj ne celas pri «fina solvo» kaj «lasta vorto».

Itamar Even-Zohar.

Norvega Kroniko

Red.: KARSTEN LANGSHOLT

Kristiansands Esperantoklubb.

26/5. Sinjorino Hauge kaj Sigurd rakontis pri la landa kunveno en Sauda. Projekto pri la Esperantista hom-kaptaĵo. La Esperantista ĉielo en ĉi tiu ĉambro havis malhelajn kaj dikajn nubojn. Sed tiam M. Stiansen komencis fulmon kaj tondron, kaj tio faris pluvadon de Daland. Tiam la ĉielo heliĝis, kaj ni ricevis sunon de sinjorino Hauge kaj piano-ludon de Birger. Tio kaŭzis someran veteron. Fino: Manĝo kune kun somera babilado kaj parolado.

Sauda Esperantoklubb

kunvenis lastfoje antaŭ la ferio 20/6 en la hejmo de ges.roj Matland.

Unue la prez. resumis la rezultojn de la landa kongreso, kaj Olav Andersen montris la bildojn kiujn li faris dum la kunveno.

Poste la prez. prezentis la diversajn somerajn arangojn en la esperanta mondo, kaj

instigis al partopreno en la kongreso en Rotterdam.

Sekvis diskutado pri la kluba laboro aŭtune, laŭ la laborplano skizita de U.E.A. Ni decidis koncentrigi niajn fortojn pri unu punkto: plifortigi la klubon, kaj ĉiu el ni provu ĝis la aŭtuno persvadi *unu — unu* — personon po unu instigante lin frekventi kurson! Do en la unua aŭtuna kunveno ĉiu membro kunportu slipon sur kiu estas skribita unu nomo, nome eventuala kandidato por kurso.

Se ni sukcesos interesigi almenaŭ 5 el tiuj «nomoj», ni povos ekstarti studrondon. Ni esperas ke ĉi tio donos pli bonan rezulton ol anoncado pri publika kurso, kio ĝis nun donis nenian rezulton.

Kafo kaj diversaj kukoj bongustis, kaj tiuj membroj kiuj ĉeestis, ŝajne estis fervoraj por komenci en la nova laborezono aŭtune.

e.m.

Sauda Esperantoklubb povis festi sian 30 jaran ekziston la 18 an de Marto en Sauda Klubb.

La prezidanto Johan Matland gvidis la



La landa Kunveno de NEL en Sauda.

feston, kiu estis tre agrabla, kaj en kiu partoprenis 28 gesamideanoj.

Post bongusta varma manĝaĵo, paroladis la iniciatino de Esperanto en Sauda, ekslernejestro Emil Håland. Li rakontis pri la unuaj paŝoj antaŭ pli ol 30 jaroj, kiam Håland sukcesis venigi Seppik al Sauda por fari provlecionon. Arthur Bjerke rakontis pri siaj unuaj jaroj en la movado, li ankaŭ estas unu el la veteranoj en Sauda. La prezidanto faris la festparoladon, kaj inter la kantoj travigis ankaŭ lia originale verkita kanto honore al la Sauda-klubo: «Amikoj, kantu kun ĝoja kor».

Ni vigle interbabilis kaj en la norvega kaj en Esperanto, Oddvar kaj Normann Birkeli kantis kaj ludis, kaj ankaŭ la prezidanto montrigis vera kantisto.

Elna Matland kaj John Malmquist prezentis amuzajn skeĉojn kiuj rikoltis grandan aplaudon.

S.ro Håland ricevis belan diplomon por sia ekfondigo de la movado en Sauda.

Rasmus Nerheim gvidis ellotadon de paska koko, kiun gajnis Håland.

Al la festo alvenis multaj salutoj, eĉ de Aŭstralio de malnova klubano.

Fine Gudmund Botnen dankis por la festo.
sekr.

Kunveno 13/4 por aŭskulti al la israelano Itamar Even-Zohar. Estis por ni granda ĝojo aŭskulti al tiel eminenta *samideano*, kiu donis al ni tre instruan bildon de siaj lando kaj popolo. Post ĉiu periodo s.ino Matland tradukis resume, kaj fine estis montrata filmo pri Israelo. La kunveno estis tre interesa, kaj donis al la gesamideanoj eblecon interparoli kun la simpatia eksterlandano dum la paŭzo.
sekr.

La Esperantoklubo de Bergen

11/4 - 66. Kunveno en Hotel Terminus. La vicprez. Leonora Sivertsen gvidis.

La ĉefa punkto estis parolado de gasto el Israelo, Even Zohar. Li tre interese rakontis pri sia hejmlando, ĝia historio, homoj kaj ilia taga vivo, kaj prezentis filmon.

Estis ankaŭ farataj demandoj al li, kaj li bonvole respondis kaj klarigis.

Ĉar ĉeestis ankaŭ iuj, kiuj ne komprenas nian lingvon, Kjell Offerdal tre lerte faris resuman tradukon.

Ceestis 30.

Raportis Jobs. Jabren.

Klubo Esperantista en Oslo.

9/5 - 67. La prez. John Berggren diris bonvenon al la kunveno.

Li informis ke la Mondfederalistoj («En Verden») okazigos sian mondkongreson en Oslo 29/7—5/8 - 67. Multaj esperantistoj partoprenos kaj la japanoj intencos proponi al la kongreso ke ankaŭ esperanto estu unu el la oficialaj lingvoj flanke de la angla, franca kaj japana lingvoj. Plue, ke nia klubo planas aranĝi ekskurson por la esp. partoprenantoj al Sundvolden kun posta kafotrinkado en la somerdomo de Else Bugge-Paulsen la 2-an de aŭgusto.

La ĉefpunkto de la programo estis prelego de John Berggreen pri «Vizito 1966 al Balkanaj Ŝtatoj kaj Nigra Maro». Akompanita de multaj lumbildoj kaj filmo li rakontis pri sia 4-semajna voaĝo tra 12 landoj.

Sub gvidado de C. Støp-Bowitz la membroj diskutis la statutŝanĝojn kiujn la estraro de N.E.L. intencas proponi al la Landa Kongreso en Sauda pentekoste.

22/5 - 67. La prez. John Berggreen salutis la ĉeestantojn al la lasta endoma kunveno antaŭ la somero. Dum la somero la klubo planas du kunvenojn — kiel kutime al la somerdomo de Eva kaj Carl Støp-Bowitz en Oxval 7/6, kaj al Sundvolden kun posta kafotrinkado en la somerdomo de Else Bugge-Paulsen 2/8.

Li legis la protokolon pri la Landa Kongreso de N.E.L. en Sauda pentekoste, en kiu 18 membroj de nia klubo partoprenis.

C. Støp-Bowitz rakontis pri la ceteraj aranĝoj dum la restado en Sauda, inter ili la interkonatiga vespero sabate, kaj la kongresa festeno dimanĉe, kiuj estis tre sukcesaj. Ankaŭ okazis ordena promocio de «Pro Merito».

La lingvan instruadon hodiaŭ prizorgis Otto Prytz. La temo estis la prononcado de Esperanto, kaj li donis tre trafajn kaj ilustrajn ekzemplojn pri la miskomprenoj kiujn oni povas kaŭzi se la literoj ne estas tre klare prononcataj.

C. Støp-Bowitz gvidis la divenkonkurson en formo de vetado («Tipping»).

Ceestis 28 membroj kaj unu gasto, nome la japano Ichi Morita — la sekretario de la Mondkongreso de Federalistoj. Li parolas suface bone la norvegan lingvon, kaj lernas ankaŭ Esperanton.

Finfine la prez. deziris al ĉiuj bonan someron.
Raportis Harda Danielsen.

Klubo Esperantista en Oslo.

Ekskurso al Oksvall 7/6 - 67.

Je la 18-a horo ni enŝipiĝis por pasigi la lastan klubkunvenon antaŭ la ferioj en la somerdomo de Eva kaj Carl Støp-Bowitz.

La prez. John Berggren bonvenigis ĉiujn kaj dankis la gastigantojn ĉar ili ankaŭ ĉiujn jaron invitis la klubanojn al sia somera hejmo.

C. Støp-Bowitz, prezidanto de la ekzamena komisiono, disdonis diplomojn al Chr Mortensen, Aslaug Refsing kaj Jørn Selstad, kiuj plenumis la superan ekzamenon. Li gratulis al tiuj 3 diligentaj studentoj kaj instigis ilin al plua studado kun la instruista ekzameno kiel celo.

Otto Prytz legis humuran rakonton «Embarasa Situacio», verkita de Aage Storm.

Post la kafopaŭzo (kafon donacis Eva kaj Carl Støp-Bowitz), Brynhild Østmo gvidis diversajn ludojn. Ankaŭ Kjell Gustavsen prezentis tre amuzan ludon kiel sufloro («suflikisto»).

Oni tiris la lotumitan keston da cigaroj donacitan de Rudolf Dreyer. Johnny Andersen, Oslo Lysverker, gajnis ĝin.

Ni multe kantis je akompano de Carl kaj Harald Støp-Bowitz.

La vetero estis bela, kvankam iomete malvarma, sed la ĉeestantoj pasigis tre agrablajn vesperon en gaja etoso.

Raportis Harda Danielsen.

Ekskurso al Ringerike 2.8.1967.

Dum la kongreso de la Mondfederalistoj («En Verden») en Oslo la klubo invitis la esperantistajn partoprenantojn al ekskurso la 2-an de aŭgusto. La plano estis ke ili vizitu «Kongens utsikt» kun posta kafotrinkado en la somerdomo de Else Bugge-Paulsen. Bedaŭrinde la aksterlandanoj ne povis veni. Ili estis forvojaĝintaj aŭ aliloke okupataj. Tamen renkontiĝis 18 membroj de la klubo kaj ni pasigis tre agrablajn vesperon. La aero estis varma — kelkaj banis sin kaj aliaj sidis sur la strando de la Tyrifjord lago vigle babilante. Poste ni endome trinkis kafon kaj manĝis amason da bongustaj vafloj kaj kukoj. La prez. John Berggreen bonvenigis nin kaj donis kelkajn detalojn pri la agado de la japanaj mondfederalistoj, kiuj admonis la turistajn instancojn uzi esperanton en sia propagando — ankaŭ ke la mondfederalistoj mem uzu esperanton kiel la plej taŭgan lingvon en ilia laboro por internacia kompreniĝo kaj paco.

La prez. dankis al Else Bugge-Paulsen ĉar ŝi tiel afable invitis nin al sia tre bela kaj hejmece somerdomo.

Raportis Harda Danielsen.

JOSEPH SCHERER

Joseph Scherer mortis la 20. julio 1967, 66-jara. Li estis svisdevena usonano. Li precipe famiĝis pro sia vojaĝo tra 41 landoj 1930—1932. Pri sia vojaĝo li rakontis en la libro «Ĉirkaŭ la mondon kun la Verda Stelo». En la Akademio de Esperanto li estis pli fone membro.

UNESKO- novaĵoj

INSTRUI EN AFRIKO

Jus aperis nova broŝuro de Unesko «Teachers for Africa» (Instruistoj por Afriko), kiu detaligas vakajn oficojn por instruistoj en mezgradaj kaj altaj lernejoj kaj universitatoj en 21 afrikaj landoj. Ĝi estas la sesa eldono en serio, kies celo estas helpi la afrikajn Ŝtatojn-Membrojn de Unesko varbi instruistojn el eksterlando.

La broŝuro konsistas el du partoj. La unua listigas 139 landajn agentejojn aŭ organizaĵojn, kiuj okupiĝas pri instruado eksterlande kaj al kiuj la instruistoj povas turni sin por ricevi informojn. La dua parto prezentas la vakajn oficojn en la 21 landoj. Tie troviĝas informoj pri kvalifikoj bezonataj, metodo de kandidatigo, kondiĉoj de laboro, lingvo de instruado ktp.

La broŝuro «Teachers for Africa» estas senpage ricevebla ĉe Unesko (Dokumentoj kaj Publikajoj), Place de Fontenoy, F-75-Paris (7e). (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA.)

GIGANTA SUNFANDEJO EN PIRENEOJ

En Odeillo en la Francaj Pireneoj, ĉ. 1500 metrojn super la marnivelo, finiĝis lastatempe la konstruo de giganta sunfandejo. Pli ol 60 speguloj de po 44 kv. metroj direktas la sunradiajn al unu senmova spegulo de 2450 kv. metroj, fokusita al la forno mem. La fandejo kapablas varmigi po 2—3 tunoj ĝis 3500° C, pli ol duoble pli alte, ol la fandopunkto de fero. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA.)

Korespondu!

Nia Esperanto-Rondeto ĉe la Baza Mezlernejo en Náchod deziras korespondi kun norvega studento aŭ studentino (14- ĝis 18-jara) pri variaj temoj. Esperanto-Rondeto, Základní 9 — letá škola Julia Fučíka, *Nachod*, Ĉeĥoslovakujo.

Pensiulo 63-jara deziras interŝanĝi kolorajn bildkartojn. Mi kolektas kolorajn bildkartojn montrantajn al mi la mondon. Jan Liebl, Dvorskova 9, *České Budejovice*, Ĉeĥoslovakujo.

Vane mi serĉis kontakton kun via lando! Mi tre deziras korespondi kaj interŝanĝi diversajn objektojn. Mi kolektas bildkartojn de naciaj kostumoj, alumetikedojn, poŝtmarkojn, k.t.p. Mi estas 37-jara inĝeniero de ekonomio, ĉefo de financa sekcio de meblofabriko. Buru Bela, Sv. Markovica ul. 92, *Bečej*, Jugoslavio.

Mi multe legis pri via lando, sed mi deziras scii pli, tial mi petas korespondan amikon aŭ amikinon. Mi estas 27-jara; intereso: floraranĝado, loĝejoj, moderna keramiko, arkitekturo, naturo, k.t.p. Alena Wronová, bl. 234/1, *Havířov XIII*, Ĉeĥoslovakujo.

20-jara konstrua kaj arkitekta teknikistino deziras korespondi kun norvegoj. F.ino Kristina Langurova, L. Karavelov 25, *Sofia*, Bulgarujo.

29-jara kuracistino deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. F.ino Christa Pohle, 115 *Berlin-Mahlsdorf*, Briesener Weg 69, D.D.R.

Dudek ĝejunuloj deziras korespondi kaj interŝanĝi diversajn materialojn. Esperanto-klubo de Oojama Kooko, Komone 5-18-I, Itabasi, *Tokio*, Japanujo.

«Heroldo» estas la nomo de la monata fakta bulteno de Internacia Poŝtista Espe-

ranto-Asocio (IPEA). Ĉiu Kolego (PTT-, radio- kaj televidisto) povas senpage ricevadi ĝin. Skribu al Poŝtenska Kutija 25, *Sofia C*, Bulgarujo.

32-jara instruisto deziras korespondi kun alilandaj ĝeinstruistoj pri diversaj temoj de edukado. Fusacugu Kido, Higasi Mukojima 3-16-4, Sumida, *Tokio*, Japanujo.

16-jara knabo deziras korespondi kun fraŭlino samaĝa. Inter miaj interesoĵoj estas lingvoj, scienco kaj fotografado. Mi korespondos letere aŭ sonbende (2 tr; 9,5 c/s.). Keneto R. Johnson, 45 Graham House, Cumberland Road, *London N 9*, Anglujo.

25-jara oficisto tre deziras korespondadon kun juna viro aŭ fraŭlino de via lando. Interesiĝas pri ĉio, kolektas Esperantajn revuojn. Gosbert Gehlert, 86 *Bamberg*, Weide 11, Germanujo.

32-jara instruistino por surduloj deziras korespondi kaj konatiĝi kun norvegaj esperantistoj. F.ino Imreh Emilia, Práter u. 63. IV.45, *Budapest VIII*, Hungarujo.

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadresse: Boks 942, Oslo, Postgiro 100.30

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.32

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,

Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:

Johan Hammond Rosbach,

Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — Uzu tiun

adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.

Telefono: 54 727